

NORDFRANCA

ESPERANTIŝTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAÛEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo: 33, rue Marceau
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono: Francujo 10 frankoj
aliaj landoj: 8 respondkuponoj pli egalvalore
POSTCEKONTO: LILLE 403.50

A L'IMPECCABLE

VÊTEMENTS

5, Place Jean-Bart - DUNKERQUE

...l'ami des Espérantistes



Le "Café du Centre"

39, Place Jean-Bart, DUNKERQUE

...réserve le meilleur accueil
aux EspérantistesEjo de la sabataj Kunvenoj de la grupo
(18-30 / 20-30)

Esperanto parolata

Commerçants Espérantistes !

Commandez vos imprimés à notre « samideano » DELAVIGNE

IMPRIMERIE COMMERCIALE

Longpré-les-Corps-Saints (Somme)

Jus aperis !

LA NOBELA BURĜO

unu el la plej famaj ĉefverkoj de Molière
(Tradukita de Richard Levin)

Prezo : 10 francaj frankoj

Mendojn al F-ino Yv. JULLIEN,
kasistino de Lyon'a Esp. Klubo
1, quai Cl.-Bernard, LYON
(poŝtĉekkonto Lyon 637-59)

Une des œuvres les plus charmantes de Molière, un de ses chef-d'œuvres les plus impérisissables, dont la verve à la fois caustique et bon enfant a fait les délices de tant de générations, dont l'esprit, après trois siècles, reste toujours aussi jeune, aussi alerte, aussi « actuel », « Le Bourgeois Gentilhomme », nient d'être traduit en Esperanto.

« Vient d'être édité » devrions-nous dire, car le traducteur, M. Richard LEVIN, nous avoue dans la préface, que sa traduction reposait dans un tiroir depuis une quinzaine d'années.

Cette édition est le premier ouvrage de la « collection du Cercle Espérantiste Universitaire de Lyon ». Souhaitons qu'elle soit suivie de nombreuses autres publications. La littérature française est encore trop peu connue dans le monde espérantiste, et les chef-d'œuvres à traduire ne manquent pas.

Pour se procurer cet ouvrage au prix de 10 francs, s'adresser à M^{lle} Jullien, trésorière du Cercle Espérantiste Universitaire de Lyon, 1, Quai Claude Bernard, Lyon. (Chèques postaux Lyon 637-59).

Conditions spéciales aux groupes espérantistes.

Esperanto-Literaturon

je originala prezo

Liveras al vi :

ESPERANTO
BAUDIMONT-ARRAS

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

PROPAGANDO ★ INSTRUADO ★ ACTUALAĴO ★ LITERATURO
PROPAGANDE ★ ENSEIGNEMENT ★ ACTUALITÉ ★ LITTÉRATURE

Kopirajto de la enhavo rezervita. Manuskriptojn kaj sciigojn oni devas sendi nur al tiu adreso : C. VERNAY, MALO-LES-BAINS (Nord). Ni ne resendas la manuskriptojn. — La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — Les auteurs sont seuls responsables de leurs articles.

Niaj Pioniroj...

Ernest DELIGNY

Modesta homo, klara intelekto, apostola animo, tiel aperas S-ro Deligny, honora prezidanto de nia Nordfranca federacio de 1934.

Lia vivo estas kiel rekta kaj neta vojo, kiun oni ĉirkaŭrigardas per ŝanĝo okulvido, sed kiu malkovras, kiun oni ĝin trapasas, mil ĉarmojn komence neviditajn.

S-ro Deligny naskiĝis la 9^{an} de Decembro 1864 en « Fauquembergues », forma urbeto de nia ridetanta Artois. Tute juna, li eniras liceon de « Saint-Omer » por sia duagrada lernado. En 1886, li fariĝas helpa profesoro en tiu sama liceo, kie seninterrompe li dejoros ĝis 1928, ĝuste la simpation de siaj kolegoj kaj la respektplenan korinklinon de siaj lernantoj. Post sia emeriteco, li ricevas la direktadon de la grava urba biblioteko, tute proksima de la kara malnova liceo...

Jen ĉio... Sed ĉe pli detala rigardo, kiel admirinda vivo plena je paciencaj laboroj, riĉa je plej belaj rikoltoj ! Oni ne povas doni en kelkaj linioj eĉ raporteton pri lia stonda kaj fruktodona agado en la kampoj de instruado, edukado, sportoj kaj postlernejaj laboroj. Mi devigis priskribi tre mallonge lian karieron en nia movado.

En 1900, S-ro Deligny konatiĝas kun Esperanto kaj — ĉu povus esti alimaniere ? — tuj li estas allogata de la simpleco, harmonio kaj alta idealo, kiuj eliĝas el tiu nova lingvo. De 1901 li fariĝas ĝia apostolo, kaj kreas kurson en « Saint-Omer ».

Postan jaron, li fondas en la liceo unu el la unuaj lernejoj grupoj en Francujo. Ĉu oni bezonas diri ĉiujn malfacilaĵojn kiujn li renkontas, ĉiujn ironiojn kiujn li suferas kaj ankaŭ ĉiujn venkojn kiujn li gajnas kun tiu trankvila kuraĝo kiu estas unu el la ĉefaj trajtoj de lia karaktero ! Je kosto de obstinaj klopodoj li sukcesas iom post iom enradikigi la esperantistan ideon ĉirkaŭ si.

Sed baldaŭ la kampo de lia urbo ne plu sufiĉas al li. En 1904, li partoprenas kun sia grupo la internacian kunigon en « Calais », preparadon de la unua universala kongreso en Bulonjo, kies li fariĝas helpa organizanto. Kun kiu emocio li ŝatas rememorigi tiun unuan kaj tamen konvinkan etapon ! Nun venas la daŭriga serio de grandaj internaciaj kongresoj, kiujn ĉeestas regule S-ro Deligny kaj kies laborojn li sekvas. En ĉiuj grandaj urboj de Eŭropo, de Kambrigo al Budapeŝto, de Barcelono al Helsinko, li trenas siajn sandalojn de esperantista pilgrimanto kaj de nelacebla komercvojaĝisto de la Granda Ideo.

Intertempe li instruas, tradukas, skribas, paroladas, akiras valorajn helpon, kreas ekspozicion, orga-

nizas festojn, unuvorte sin donas tutan al la esperantista movado, kiun li faris la pasio de sia vivo. Tiel menciinde li aperigas en 1908 la revuon *Norda Gazeto*. Kuragan antaŭulon de nia bela *Nordfranca Esperantisto*. En 1935 li fariĝas ano de la « Lingva Komitato » kaj publikigas la historion de nia Federacio.

Kiom da entuziasmoj li naskas, kiom da samideanoj li formas ! Neble precizigi : centojn kajoble milojn.

La jaroj pasas, sed S-ro Deligny restas ĉiam sur la breĉo, kun la trankvila rideto kaj klara rigardo, kiujn ni ĉiuj konas. Kvankam la aĝo kaj la laciĝo pezas ĉiutage pli kaj pli sur liaj ŝultroj, li nelacigeble daŭrigas sian penigan pioniran laboron. En lia kurado al la verda stelo, nenio lin haltigas; oni lin vidas en Betuno, en Devro, en Dunkerko, en Lilo... ĉie, kien oni lin vokas, senzorge je la malboneco de la vetero : je ĉiaj ventoj li semas la bonan grajnon...

1936 Pasintan jaron, li estis en Arnhem, ĉiam plena de vervo, korjuna, animklara, mirinda ekzemplo de fervoro, kiu neniam ŝanceliĝis de pli ol triono da jarcento...

1937 Ankoraŭ nun, li daŭrigas direkton de du publikaj kursoj de Esperanto en sia malnova urbo de « Saint-Omer » kaj plie, dufoje en ĉiu semajno, li alportas sian necesegan helpon al la kurso de la liceo. Ha ! Se vi povus lin vidi, meze de liaj kvardek lernantoj, klinantan sian blankan kapon al liaj junaj cerboj, gvidantan kun ĉarma karesmo la unuajn paŝojn de tiuj esperantistaj buboj, kiel vi estus samtempe mirigitaj, emociitaj kaj entuziasmigitaj ! *En 1938 - donaco - +*

Ni deziru, ke nia movado konservu longatempe tiajn homojn, kies radiadpovo akiras tiom da spiritoj kaj koroj al nia afero !

Ili meritas nian respektigon.

Nian ardan agemon.

Andreo D.

English, the universal speech ?

Nous avons demandé à un Anglais son avis sur la question. Il a bien voulu nous répondre et en vers encore.

OUGH

When you find in learning English,
Hough is « how » ;
Then c-o-u-g-h, of course, you'd fancy
Would be « cow ».
But no ! When I pronounce it so, the natives
only scoff.
For « cow » is c-o-w, o-u-g-h is « coff ».

Then if to « hough » you add a « t »,
You'd think it would make « hout » ;
But, oh no ! Once again you'll find
You've got a little out.
It's « bought », and hout' is another word,
With quite a different spelling.
(Oh ! Dear ! the muddle of it all
Upon my brain is telling !)

Then t-o-u-g-h I try, I make a shot with « toff » !
But no ! Although I'm near the mark,
I am still a little off.

1936 Forsome mysterious reason, t-o-u-g-h is « tuff »
Though hough, I find, is neither « hoff »
nor « huff ».

But « hock » ! Ah, me ! How strange it is !
There seems nor rhyme nor reason.

To spell dock « dough » is orthographic treason,
For d-o-u-g-h is never anything but « doe ».
Though t-r-o-u-g-h is neither « throck »
nor « throe » :

It is « throo ». Then s-o-u-g-h I boldly
try, but ugh !

A man who hails from north of Tweed,
Declares the word is « sooch » !
Pat Murphy hears the Scotchman's word
And slyly whispers « Och » !
And don't forget, y'r honour, ough is « loch ».

Alvoko al Grupoj

Lastatempe ni ricevis kelkajn petojn por senpage abonigi kelkajn soldatojn kaj senlaborulojn, kiel tion faris *Norda Gazeto*. Ĉar la abonprezo de nia bulteno estas tre malalta kaj alivice ni ne ankoraŭ atingis la nombron da abonantoj por kovri la grandajn elspezojn ligatajn kun la eldono de tia grava bulteno kia estas la nia, ne estas por ni eble respondi jese al tiuj petoj. Ni turnas nin kun varma alvoko al la esperantistaj grupoj ke ili mem zorgu pri la abonigo de siaj membroj nune soldatoj aŭ senlaboruloj.

Ĉiu grupsekretario klopodu pri tio, ke tiuj samideanoj ricevu regule nian bultenon.

Pri tutmonda Stenografio

FONETIKECO.

La diversajn skribojn oni povas dividi en du klasoj : tiuj, kiuj per siaj signoj prezentas ideojn ; oni nomas ilin « ideografioj » kaj tiuj, kiuj prezentas sonojn ; ili estas nomataj « fonografioj ». Alivorte, tiuj lastaj estas la fonetikaj skriboj.

La Hieroglifoj, la hina kaj japana skriboj, same kiel niaj ciferoj, apartenas al la ideografaj skriboj. Ili ne prezentas sonojn sed ideojn. Komparu iujn ciferojn kun la litera skribo de la sama valoro : ekzemple 1 kun unu, 100 kun cent, 1.000 kun mil, 1936 kun mil-naŭcent-tridek-ses, k. t. p., vi povos konstati, ke nur la duaj formoj montras la sonojn de la vortoj, dum la unuaj montras nur ideon de nombroj pli aŭ malpli grandaj.

Do, ĉiuj stenografioj, ĉar ili celas prezentadon de la sonoj, estas fonetikaj skriboj.

Tamen oni kutimas azi tiun vorton nur por tiuj sistemoj, kiuj per diversaj rimedoj prezentas tre precize ĉiujn sonojn de ĉiuj vortoj.

Por tiuj sistemoj, ĉiuj sonoj, ĉu vokalo, ĉu konsonanto, devas esti prezentataj, aŭ per speciala signo, aŭ per dikeco, longeco, pozicio aŭ per aparta helpa signeto. Tiel skribita, ĉiu vorto — eĉ sola — estas senerrare legebla, kaj neniam frazo povas esti duŝenca, se ĝi ne estas tia ankaŭ parole.

Oni ne uzas la vorton « fonetika » por la sistemoj kiuj — kvankam prezentante la parolon — ne skribas ĉiujn vokalojn kaj konsonantojn, aŭ almenaŭ ne prezentas ilin. Efektive, se tiuj sistemoj estas fonografaj skribmanieroj, multe da vortoj, per ili skribitaj, estas legeblaj diversmaniere. Nur la kunteksto povas doni la ĝustan valoron al tiuj vortoj. Eĉ, spite tion, okazas kelkfoje, ke tuta frazo estas legebla duŝence, kvankam tiuj du sencoj estas prononceblaj per malsimilaj sonoj.

Ĉu ni povas nomi tiujn stenografiojn silabaj sistemoj ?

Silaba sistemo estas tiu kiu per unu signo prezentas tutan silabon. Nu, tiu skribmaniero ne malebligas, ke la sistemo estu samtempe fonetika, kaj en kelkaj silabaj sistemoj ĉiuj sonoj estas tre precize montrataj.

Plie, por la dirtaj sistemoj la nomo « silaba » ankaŭ ne plene taŭgas, ĉar ili ne prezentas ĉiujn silabojn, sed nur la ĉefan strukturon de la vortoj. La adjektivo kiu — laŭ mi — plej bone taŭgas por kvalifiki tiujn sistemojn estas « duonfonetika ».

Se oni nomas fonetika tiun sistemon, kiu precize skribas ĉiujn sonojn kaj ebligas stenografi ĉiujn ajn vortojn kaj ilin relegi sen eraro, oni devas nomi duonfonetika sistemon.

Literatura Angulo.

Ni konatiĝis jam kun « Fundamento de Esperanto », tiu nepre necesa libro por ĉiu esperantisto : la bazo por nia lingvo.

Ĝi aperis en tiu memoriinda jaro kiam la grandioza valoro de Esperanto montriĝis unuafoje en la Universala Kongreso de Bulonjo-ĉe-Marco.

Havi ĝustan ideon pri tiu kongreso, kompreni la sinfogesan entuziasmon de la partoprenantoj, kiuj travivis rivelacion, estas malfacile.

2 jarojn antaŭe, en 1903, estis aperinta la unua pli ampleksa libro « Fundamenta Krestomatio », la verko, kiun sendube ĉiu pilgrimanto al la Bulonja Kongreso fonde trastudis. Ĉar kiel « Fundamento de Esperanto » estas nia lingva bazo, tiel « Fundamenta Krestomatio » estas nia literatura bazo.

La plej bonaj diversnaciaj verkistoj kunlaboris al ĉi-tiu 460 paĝa verko (prezo : nur 15 fr.) en kiu troviĝas multaj artikoloj, ankaŭ de Zamenhof mem, 31 ekzercoj el « Ekzerzero », ĉarmaj legendoj, interesaj rakontoj, lingvaj kaj sciencaj artikoloj kaj plie kolekto de poemoj.

Pri ĉi-tiu grava libro Zamenhof mem diras en la antaŭparolo : « Ĉiuj artikoloj en la F. K. estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ, se ili estas skribitaj de aliaj personoj, ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas ».

Eĉ tute nova esperantisto povas tuj komenci la legadon de F. K. ĉar la zorga gradigo de la teksto kondukas nin senrimarke al pli vasta scio. — S.

Deziras korespondi :

S-ro **GEORGIO POREZ**, B. P. 30, en CAUDRY (Nord) Francujo, deziras korespondi kun ĉiuj pri ĉiuj temoj. Respondo certa.

F-ino **S. MUNTZ**, 49, rue François-Gautier, en LENS (Pas-de-Calais) Francujo, deziras korespondi nur kun gejunuloj.

PENSO

La vivo estas plena kaj interesa tiam, kiam oni batalas kontraŭ lajlojn plej obstinajn.
GORKIĜ MAXIM.

kio ne donas la eblecon relegi senerare ĉiujn stenografitajn vortojn, kaj devigas uzi la kutiman skribon, kiam oni volas esti certa bone traduki ne kutiman vorton, kiel ekzemple teknikan, sciencan, fremdan aŭ propran nomon.
(daŭrigota)

P. FLAGEUL.



Ni ! la Komencantoj !

— Ĉu la objekto estas super mi ?
 — Jes!... respondas RID/ANTE ĉarma sinjorino.
 — Mi petas, sinjorino, bonvolu respondi per tuta frazo.
 — Jes ! la objekto estas super vi !
 — Bone !

La blonda, SERC/ANTA fraŭlino, LEV/INTE al la plafono siajn esplor/-em/ajn okulojn, rigardas kun iometE da malico Sinjoron Verdulo kiu devas respondi al la SEKV/ANTA demando.

DumE, juna, nova samideano, kiu estas TRINK/ONTA tason da forta kafo, kant/el/tas ironiE :
 « Ĉio estas bonega, Marlizina Moŝto ! »

Ni estas mult/nombraj en la AKCEPT/EM/A salono de nia norda « Esperanto Domo "Eole" ».

Tamen, la vetero ne estas bela ! Forta, orienta vento krak/maĉ/ig/is al ni sufiĉE multE da sablo. Tio ne gravas. Oni diris al mi ke, por morti, estas necese engluti unu kilogramon da sablo !

La griza Norda Maro, mal/sek/ig/-inte la sablo/hordon dum ses horoj, retir/ig/as mal/volontE, ĉar, senĉese, kvazaŭ sen/disciplina brutaro, la ond/eg/oj revenas furiozE sed ilia ek/jet/ig/o, rapide ROMPITA, finE sukcesas nur for/lasi, de loko al loko, ŝaŭman, dube/blankan rembur/rul/aj/on.

La suno, hodiaŭ, mal/bon/humor/-ig/as. Nu ! DES MALPLI BONE ! Ni, Esperantistoj, ĉu ni ne ĉiam

havas sunon en la koro ? Sufiĉas al ni, ĉu ne ?

Do, malbonhumoriga, suno ! murmur/eg/u, maro ! blovu, vento !

Ne gravas. En nia ŝatata rondo la okuloj brilas, la ridadoj aŭd/ig/as, la koroj kantas !

La koroj kaj la buŝoj ankaŭ...

Jen ! mia mano
 Samideano
 Ĝoju ol, trinku ni,
 Je via sano !

STARANTE ĉirkaŭ la fortepiano, ĉiuj, tutgorĝE, ripetas la ekzalt/IG/an re/kant/aj/on. La repertuaro estas diversa, parolojn kaj ariojn oni povas facile en/kap/ig/i. Neniu diras : « Mi ne povas kanti ! »

Esperantista miraklo !
 Kaj, kiam alvenas la momento de la dis/ig/o « Tra la mondo iras forta voko ».



Ĉu vi bone amuz/ig/is, sinjoro ?
 Jes, certE, fraŭlino, mi estas tre kontenta, mi ne perdis mian tempon VENANTE ĉi-tien, post-tag/meze. Kiam okazos la VENONTA kun/ig/o ?

— Eble, la okan de Junio. Ĉi-monatE dum la bela sezono, ni kunvenos en la Esperanto-Domo, la unuan aŭ la duan dimanĉon. Ni ludos, kantos, babilos...

Estos, precipe por la komencANTOJ, bona okazo al/kutim/IG/i al la konversacio kaj inter/kon/at/-ig/i kun la aliaj membroj de la grupo, ĉu ne ?

Ho ! Jes ! fraŭlino, la ideo estas bonega, sed, diru al mi, ĉu vi opinias ke multaj esperantistoj ĉe/estos ĉiujn kunvenojn ?

DimanĉE oni apartenas al sia familio : patroj kaj patrinoj tre ŝatas promeni kun siaj gefiloj ;



edzinoj ne estas kontentaj kiam la edzoj for/iras... kompren/eble...

— Trankvil/ig/u, sinjoro ! Ni pri-pensis tiujn problemojn... La solvo estas tutE simpla. Venu ĉiuj kun via familio ! La domo estas vasta kaj agrabla, la vid/aj/o sur la maro, belega. SomerE, anstataŭ sidi dum unu horo aŭ du sur benko de la mar/digo aŭ ĉe in antaŭ/kaf/ejo, venu al "Eole" de tempo al tempo. Vi faros sanan promenadon, vi pas/ig/os ĉarman posttagmezon inter afablaj gesamideanoj kaj vi hejmen/re/iros, vesperE, tute feliĉaj !



Tio estas ALMENAŬ la favoro, kiun, korege mi deziras al vi, Ĝis revido !...



KLARIGOJ

Mi petas, atentu pri :
 ATA ITA OTA
 ANTA INTA ONTA
 Rimarku : RIDANTE : en riant (manière).
 LEVINTE : ayant levé (manière).
 La finale des adverbes : DUME, IRONIE.
 DES MALPLI BONE ! tant pis !
 DES PLI BONE ! tant mieux !
 Atentiu ankaŭ pri : IG kaj IĜ
 Bonvolu serĉi la aliajn klarigojn en via vortaro, precipe por la kun/met/it/aj vortoj. Tiel, vi bone komprenos kiel oni « faras » la vortojn.
 Estas tre interesa ! Vi vidos !

Cours d'été

On se souvient du grand succès des cours d'été de 1935 et 1936.
 Ceux de cette année auront lieu du 19 au 30 juillet, à "EOLE", Digue de Mer, Malo-Bains. S-ro Jak Cent étant empêché, la direction de ce cours sera assurée par notre ami et sympathique professeur hollandais Henk THIEN. Il y aura des cours de débutants, des cours de perfectionnement et des cours de conversations.
 Les prix sont extrêmement réduits. Tous ceux voudrez vous instruire en profitant d'excellentes vacances.
 Écrivez à ESPERANTO - DUNKERQUE.

Redakcia Leterĉesto



Ni ricevis lastatempe multnombrajn leterojn : gratulajn, kritikajn, kuraĝigajn, k. t. p. Bedaŭrinde ne estas eble al ni respondi al ĉiuj.

Al multaj : Dankon pro viaj kuraĝigaj leteroj. Tempo mankas al mi por vin persone respondi.

Al helkaj : Viaj kritikoj interesas nin. Sed ĉu ankaŭ vi faris vian devon, varbante abonantojn por nia revuo ?

Al S-ro Ego, en Caudry : Mi esperas ke nun vi ricevis vian gazeton. Dankon pro viaj salutoj. Akceptu la miajn.

Al S-ro Eta Grünblatt, Hungarujo : Via letero tre plezurigis nin. Abono al Nf. E. estis antaŭpagita por la tuta jaro de via franca korespondanto. Ne forgesu danki lin.

Al S-ro E. Erhards, en Riga : Artikolo kaj letero viaj tre plaĉis al mi. Mi skribos baldaŭ same al samideano Dance.

Al S-ro Duchochois : Bone mi ricevis la gazeton. Dankon !

Al S-ro Dumarquez : Jes, mi ĉesfos la kunveno en Saint Omer. Salutojn.

Recenzo...

« UNUA LIBRO DE S. I. T. »

Kun vera plezuro ni tralegis tiun « unuan Libron » eldonitan de « Stenografa Instituto Tutmonda ». Scienca Asocio por la disvastigo de la Esperanta Stenografio. La aŭtoro, kiun ni gratulas, estas nia bona amiko kaj kunlaboranto, S-ro P. Flageul, Prezidanto de S. I. T., kaj kies tute neutralaj artikoloj pri stenografio estas tre ŝatataj de multnombraj legantoj de Nf. E.

Tiu libro reprezentas grandegajn klopodojn kaj laborojn, ĝoje plenumitajn de la aŭtoro. La enhavo estas diversa sed ĉiam interesa : biografio de Zamenhof, dokumentoj pri la fondo kaj agado de S. I. T., rimarkoj por alfaro de Stenografio al alia lingvo, multaj fotografiaĵoj, k. t. p. Resume : kuraĝa kaj rimarkinda laboro sur la esperanta kampo favore stenografio.

Prezo : 10 frk. Ricevebla de « Stenografa Instituto Tutmonda », 9, boulevard Voltaire, à Issy-les-Moulineaux (Seine). — C. V.

Interesa propono

ZAMENHOF, liaj nivo kaj verko. — « Esperanto-Dunkerque », senpage, sendos prunte por 14 tagoj la belan verkon de Privat : « La vivo de D-ro Zamenhof », laŭvice al ĉiuj legantoj de Nf. E. kiuj petos ĝin per simpla poŝtkarto.

ESPERANTO kaj RADIO

Esperanto kaj radio estas du fenomenoj de la moderna kulturo, kiuj havas multon komunan kaj povas tre efektive helpi unu la alian. Hodiaŭ la lingva kaoso de Eŭropo estas tiel impresa al ĉiu ajn dank'al la radio kiel neniam antaŭe en la historio, kaj la aŭskultantoj de radio tre bone povas juĝi la neceson de internacia lingvo. La radiaj ondoj disvastiĝas ĉien ne malhelpate de la diversaj popoloj, se ne, la radio tute dependus de la nacilingvoj. Jen estas kampo kie Esperanto povas doni grandan utilon kaj ideale plenumi sian taskon interkomprenigi kaj interkonsenti la popolojn.

La uzado de Esperanto en radio ne estas afero de estonteco. Jam nun ĉiu radio-aŭskultanto havus utilon, se Esperanto estus uzata por la anonco de interesaj programoj. Multaj esperantaj frazoj estas kompreneblaj al homo, kiu ne lerninte esperanton havus anstataŭe iomajn lingvajn sciojn kaj krome ĉiu homo kapablas lerni en malmulta tempo tiom da Esperanto, ke li povus profiti de esperantaj elsendoj. Kontraŭe estas ega streĉo necesa por lerni tiom da alia fremda lingvo, por ke oni povu kompreni ĝin en laŭparolilo.

La radio sialtante multe povas helpi la disvastigadon de la mondlingvo sendante kursojn kaj, nerekte, ofte uzante Esperanton por prelegoj, k. t. p., tiel ke la praktika uzo de Esperanto fariĝas pli kaj pli granda kaj per tio pli kaj pli granda ero de homoj estas logata al la lernado de Esperanto. Okazas interŝanĝo de servoj inter Esperanto kaj radio: Esperanto utilas al radio, radio al Esperanto.

Estas konate, ke la direktoj de semi-stacioj estas ambiciaj, ke iliaj elsendoj estu ofte aŭskultataj eksterlande. Por atingi eksterlandajn aŭskultantojn kelkaj stacioj provis sendi en eksterlanda nacilingvo, ekz. Roma, Luxemburg, Budapeŝt, k. a. Sed tiamaniere ili nur atingas unu fremdan landon, ĉar ĉiu nacilingvo ja estas limigata al sia teritorio. Per Esperanto la radio-stacioj povas atingi multe pli grandan rondon. Esperantistoj ekzistas en ĉiuj landoj kaj ili, laŭsperte, tre diligente aŭskultas la esperantajn elsendojn. Multaj stacioj jam ekkonis tiun valoron de Esperanto kaj pli malpli regule uzas ĝin.

Laŭ la bedaŭrinde ne tute kompleta statistiko de Internacia Radio-Servo (komi-

siita de U. E. A.) en la jaro 1934: 74 stacioj en 15 landoj elsendis 1747 esperanto-elsendojn, inter tiuj, 1377 prelegoj kaj 370 kursoj. Tio jam estas sufiĉe impona, sed se la esperantistaro ankoraŭ pli intense montrus sian partoprenon, pliaj sukcesoj povus esti atingataj. Por montri kion direktoro de granda radiostacio opinias pri esperantaj elsendoj, kelkaj paroloj el la parolado de Antoni Slavik, direktoro de radio Brno, estu citataj, kiun li faris okaze de la rekomenco de la Esperanto-sezono de tiu stacio:

« La esperantistoj ĉirkaŭ siaj laŭparoliloj jam estas granda familio. Miloj aŭskultas niajn programojn, kiuj atingas ilin en komprenebla lingvo. Ilia partopreno kaj la esprimo de ilia intereso estas tiel konvinkaj, ke ni ne povas ne atenti ilin. Niaj Esp.-programoj ne nur estos daŭrigotaj, sed ankaŭ plimultigitaj. Ni ne celas propagadon per niaj programoj, sed ni tradukas parton de niaj elsendaĵoj en Esperanto, por ke pli granda rondo ne scianta la ĉekoslovakajn lingvon bone povu kompreni ilin. La Esperanto-elsendoj de la ĉekoslovakaj stacioj ne plu estas eksperimento, sed memkomprenebla kompletigo de nia normala programo ».

La ĉekoslovakaj stacioj cetere elstaras inter la verdaj stacioj, ĉar ili ne nur sendas paroladojn aŭ kursojn, sed ankaŭ muzikajn kaj literaturajn programojn de sufiĉe longa daŭro en Esperanto. Oni rememoru ekz. pri la « Vendita Fianĉino » lastjare, aŭ la dramo de Capek « Rossums Universal Robots » de pasinta novembro. Ankaŭ la aŭstria radio estas tre amika al Esperanto. En aprilo 1934 unufoje aktiva ministro, nome ministro Stokinger, parolis en Radio-Vienne. Nuntempe Vieno elsendas kurson kaj komunikojn. Inter la stacioj kiuj ĝuste nuntempe favoras Esperanton estas citindaj: Hilversum, Roma, Tallinn, Sottens, ĉekaj Stacioj, Nice, Lille, Paris PTT, Marseille. Oni povas nun aŭskulti almenaŭ 20 elsendojn en Esperanto ĉiusemajne. La programo estas publikigata ĉiusemajne en *Heroldo* kaj parte en la aliaj Esperanto gazetoj. Fakte neniu eksterlanda lingvo estas tiel multe uzata en radio kiel Esperanto. Jen kampo, kie Esperanto jam komencis grandskale anstataŭi la naciajn lingvojn.

Arthur BAUR.

Ĉiuj en AMIENS, la 2^{an} de Majo 1937 !...

Vivo de la Grupoj

★

ALBERT. — *Les cours organisés grâce à l'initiative de M. et Mme Arnaud et de M. Caron continuent avec plein succès.*

40 élèves y viennent assiduellement.

Depuis la maladie de Mlle Hansen, le cours est fait tous les mercredis par Mlle Denise Dieulot, qui est tout à fait remarquable pour l'enseignement par la méthode Cseh.

AMIENS. — *Chaque lundi et chaque vendredi, cours élémentaire par la méthode Cseh, par Mlle Denise Dieulot.*

Chaque mardi, cours supérieur professé par Mlle A. Colléatte.

Chaque mercredi, cours élémentaire, professé par Mme Victor.

Une fois par mois, réunions amicales à l'hôtel de ville.

— *Le 10 février a eu lieu une causerie de M. Guillaume, sur la Conférence internationale « L'Espéranto dans la Vie Moderne », qui se tiendra à Paris à la Pentecôte.*

Nécrologie. *Notre groupe vient d'être éprouvé de nouveau par le décès de Mme R. Grisier, épouse de notre sympathique vice-président. A M. Grisier et à Mlle Suzanne Grisier, sa fille, nous adressons nos sincères condoléances.*

ANZIN. — Dum la ĝenerala kunveno de la grupo estis definitive starigita la ĵena grupestraro: Prezidanto, S-ro Lenglé; Viceprezidanto, S-ro Mommaerts; Sekretariino, S-ino Mommaerts; Helpsekretariino, F-ino Decaux; Kasisto, S-ro L. Canonne; Helpkasisto, S-ro Fayola; Bibliotekisto, S-ro Lapiez. Krome, estis starigita speciala komisiono por la aranĝo de festoj, ekskursoj, baloj, k. t. p.

— La 4^{an} de Majo okazos letervespero. La eksterlandaj samideanoj estas petataj sendi leterojn kaj poŝtkartojn al la grupo: S-ino Mommaerts, 2 bis, rue Ferrer, Anzin.

— La ekzameno por « Atesto pri Lernado » okazos la 23^{an} de Majo.

ARMENTIÈRES — La urbestraro konsentis ke la Esperantista Ekspozicio okazu en la Juĝeja Cambro de la Urbodomo.

Krom la federacia materialo estis ankoraŭ ekspoziciitaj multaj esp. libroj eldonitaj en Francujo kaj eksterlande kaj la korespondantoj kun ilia traduko, kiujn la grupanoj ricevis dum la pasinta jaro. La portreto de S-ro Thien, pentrita de nia grupano S-ro Sally, staris kiel memorajo sur honora loko.

ARRAS. — Sekve de niaj klopodoj, nia deputito, S-ro de Diesbach aliĝis al la parlamenta grupo por defendo de Esperanto.

— Dank'al helpo de S-ro Bouvot, esperanta rubriko regule aperas en la ĵurnalo *Le Combattant du Pas-de-Calais*.

— Ĉiuj kursoj kaj kunvenoj okazas tre regule.

DENAIN. — La kurso gvidata de S-ro Gauvin ĉiujauĉe en la subteretaĝo de la urba teatro estas vizitata regule de deko da lernantoj. Baldaŭ okazos ĝenerala kunveno de la grupo por la reelektado de nova komitato. Kunvokiloj estos dissenditaj al ĉiuj novaj kaj malnovaj gesperantistoj. Oni pridiskutos la starigon de biblioteko kaj la rimedojn por revigligi la kluban vivon. Oni intencas aranĝi baldaŭ prelegon kaj amikan festeton.

DESVRES. — S-ro Dumarquez, prezidanto de la grupo, sukcesis aperigi artikolon pri Esperanto en la instruist-sindikata bulteno de departemento Pas-de-Calais. Li esperas tiamaniere varbi novajn adeptojn inter la instruistaro.

— Multaj grupanoj, kun vera plezuro, aŭskultis la radiodissendon el Brno.

— La loka ĵurnalo *L'Echo du Mont Hulin* publikigis rakonton premianta ĉe la 17^a internacia literatura konkurso dum la Floraj Ludoj okazintaj la 31^{an} de Majo 1936 en Barcelona kaj tradukitan el Esperanto de S-roj Dumarquez kaj Demulder. La aŭtoro de tiu bela rakonto titolita « Kristnaska arbo » estas S-ro Henryk Gielb el Warszawa.

DUNKERQUE. — Marde 2^{an} de Februaro dum la Ĝenerala Kunveno estis adoptata la morala kaj financa raporto, akceptataj pli ol 40 novaj membroj. Oni renovigis 1/3 de la komitato: elektitaj aŭ reelektitaj: F-ino Couget, S-roj Vanhove, Willaert, Platey, Lasuye, Leloic, Lesage.

— Nun post la fino de la malfavora periodo de la festoj, la kursoj estas de nove pli vizitataj kun granda kontento de ĉiuj. Faru viziton, vi estos surprizata: ĵaŭde: komencantoj; vendrede: progresintoj; marde: konversacioj (ĉiuj en la urbodomo, iam antaŭ la 7^a ĝis la 8^a).

— Ni ĝojas pri pli bona faro de nia viceprezidantino, F-ino Spyns, kiu pro troa laĝo devis momente ĉesi alian kurson. Koran dankon al S-ino Platey kiu bonvole anstataŭis ŝin dum pli ol monato kaj bone instruis, kaj al F-ino Pauwels kiu siavice ŝin anstataŭas kaj ankaŭ lerte sukcesas laŭ la sama rekta metodo. Tio pravas ke estas multaj laboremaj membroj en la grupoj ĉiam pretaj helpi kaj la utilecon de vojaĝo al Arnhem kien ili tri iris.

— Por Marto 2 prelegoj kaj 1 gaja vespero estas preparataj. Marde, 9^{an} de Marto en la urbodomo, je la 7^a S-ro Caubel parolos pri « Rememoroj el Vojaĝoj ».

(daŭrigo paĝo 10)



En nia Federacio

Prezidanto : S-ro Albéric HUMEZ, 13 ter, rue Morel, à Douai
Sekretario : Jak. CENTNERSVER, 9, rue Ferrand, à Valenciennes

Services fédéraux.

Tous les membres de la Fédération peuvent obtenir gratuitement, sous certaines conditions, dont les frais de retour après usage du matériel prêté :

1. Prêt de livres de lecture de la bibliothèque circulante ;
 2. Prêt de matériel d'exposition : journaux, revues, livres, brochures, affiches, photos, etc ;
 3. Des articles pour insertion dans la presse locale, régionale ou spécialisée ;
 4. Liste complète des émissions radio et des programmes détaillés intéressants ou parvenus trop tardivement pour le bulletin.
- Pour bénéficier de ces services il suffit d'écrire au secrétaire des sections intéressées dont les adresses sont indiquées ci-après.
- Enfin pour tout autre service non mentionné, tel qu'envoi de conférencier et tous renseignements, écrire au secrétaire fédéral ou au rédacteur en chef du bulletin, notamment pour les abonnements aux revues, aux différents journaux espérantistes.

Bibliothèque circulante. — Délégué : J. CENTNERSVER, 9, Rue Ferrand, à Valenciennes.

Exposition circulante. — Délégué : M. et Mme VOLQUEMAN, 36, rue Turgot, à Lille. Téléphone 56.48.

Articles de presse. — Délégué : « Esperanto-Dunkerque ».

Programmes radio espérantiste. — Délégué : Maurice NOGÉ, 21, rue Maréchal-Joffre, Dunkerque.

Il a été envoyé aux principaux groupes une centaine de circulaires concernant l'émission de Brno ; malheureusement très peu de compte-rendus nous sont parvenus témoignant de l'intérêt qui a été pris à cette émission.

Tous ceux ayant envoyé leur compte rendu ont été informés en détail de l'importante émission de Ljubljana.

Aucun rapport ne nous est parvenu depuis plusieurs mois des délégués d'Arras, Amiens, Abbeville, Anzin, Desvres, Denain, Douai, Lens, Lille, Liévin, Caudry, Armentières, Saint-Omer et Valenciennes. Nous prions ces groupes de choisir un délégué chargé d'écouter les émissions intéressantes, de les faire connaître et de remercier les stations qui le méritent pour les encourager à continuer leur soutien.

Par contre MM. Charlet et Parent (Hautmont), Quintard (Maubeuge), Buronfosse (Pont-sur-Sambre), nous aident d'une façon modeste ainsi que MM. Marin (Calais) et Grand (Douges), pour insertion des programmes dans la presse locale.

Service de Presse.

En décembre et janvier, il a été adressé 9 articles et 5 communiqués qui ont parus dans Le Nord Maritime, Le Progrès de la Somme, ainsi que 8 articles radio insérés dans Le Petit Radio, Radio Magazine et Le Petit Calaisien.

Un article touristique dans Le Volant sur Lille (traduction M. Nogé) et 2 articles dans Le bulletin mensuel des Employés de Commerce, par M. Vernay.

Nous avons relevé 3 articles très longs dans La Frontière, 4 dans Le Bonhomme de Douai, 2 dans Le Journal de Lens, 1 article avec photo du Comité fédéral dans Le Réveil du Nord et 8 dans Le Progrès de la Somme.

A noter que le Progrès de la Somme publie chaque jour le programme des principales émissions espérantistes.

LIBROJ

Estas aĉeteblaj ĉe la ĝenerala sekretario : *Histoire de la Fédération du Nord*, prezo 3 fr. ; *Conseils aux Groupes Espérantistes*, prezo 4 fr. ; *Guidlibro por Superaj Ekzamenoj*, prezo 4 fr. 75. Ĉiuj prezoj entenas la send-afrankon.

Al niaj abonantoj...

Tiuj el niaj abonantoj, kiuj deziras ricevi fine de 1937 bnditan kolekton de N.F.E. (novembro 1936 ĝis decembro 1937) kun pergamena kovrilo sur kies dorso estos presita la titolo por starigi ĝin en libroŝrankon, estas petataj alskribiĝi antaŭ la 31^a de marto 1937. — Prezo de tiu kolekto : 16 frj (sendotaj afanke), kun mendo al la administracio de nia bulteno.



Ĉiuj en AMIENS
la 2^o de Majo 1937 !...

KUNVOKILO

al la kunveno de la Federacia Komitato
okazonta en Saint-Omer la 7^{an} de Marto 1937

Karaj Gesamideanoj,

Ni tulkore invitas vin ĉeesti la kunvenon de la Federacia Komitato, kiu okazos en Saint-Omer, la 7^{an} de Marto 1937, en la Komerca Cambro (dua etaĝo), je la 10^a akurate.

La tagordo de la kunveno estas la jena :

1. Legado de la ricevitaj leteroj ;
2. Mallonga raporto de ĉiu faktestro ;
3. Starigo de novaj grupoj ;
4. Kasa situacio. Pago de la kotizoj ;
5. Esper-budo en Lille-a Komerca Foiro ;
6. Tagordo de la ĝenerala kunveno de la Federacio dum la Federacia Kongreso en Amiens, la 2^o de Majo 1937 ;
7. Loko kaj dato de la venonta komitata kunveno.

Je la 12^a, post la kunveno, vizito de la ĉiĉa urba biblioteko.

Je la 13^a, komuna tagmanĝo. Prezo : 20 fr. (ĉio entenata : trinkajo kaj trinkmono). Bonvolu sendi la aliĝojn al la tagmanĝo antaŭ la 2^a de Marto al S-ro E. Deligny, 4, rue Allent, Saint-Omer (Pas-de-Calais).

S-ro E. Deligny, Honora Prezidanto de la Federacio donace proponos al la ĉeestantoj, dum la tagmanĝo, pokalon de ĉampanvino okaze de la 35^a datreveno de sia esperantista profesorigo.

Post la tagmanĝo, vizito de la muzeoj.

La komitatanoj kaj grupgvidantoj estas petataj konigi perletere sian opinion kaj sugestojn pri ĉiuj supre-menciitaj punktoj de la tagordo. Tiuj, kiuj ne povos partopreni nian kunvenon estas petataj sendi riprezentanton.

Ni esperas ke niaj gefederaciianoj alvenos multnombre al la esperantista tago en Saint-Omer kaj ni salutas ilin plejsamideane.

(Ĝis baldaŭa revido.)

La ĝenerala Sekretario,

Jak CENT
3, rue Ferrand, Valenciennes

La Prezidanto,
A. HUMEZ.

ANTAŬRAPORTO pri la Komitata Kunveno

I. Funkciado de diversaj fakoj dum la pasinta jarkvarono :

IZOLULOJ. — S-ro Brunet multe propagandis, precipe ĉe la izoluloj loĝantaj en la sama loko por instigi ilin krei grupon. La afero estas sur bona vojo en Albert, Cambrai, Tourcoing kaj en multaj urboj de Artea Distrikto. De la prospero de tiu fako dependas la kreo de novaj grupoj kaj, konsekvence, la disvastiĝo de nia Federacio.

RADIOSERVO. — S-ro Nogé dissendis cikuleron pri la nuna stato de la Esperanto-todisendoj. Neniu dubas pri la graveco de tiu potenco propagandilo, kiu estas la radio, sed por ke la disaŭdigo de Esperanto estu certigita ĉe la radio-stacioj estas nepre necese ke la aŭskultantoj sendu leteron aŭ karton post ĉiu disendo.

BIBLIOTEKO. — Ĝi kontentige funkcias. Kelkaj izoluloj profitas de tiu servo, ankaŭ la grupo « La Verda Stefo » en Caudry, kiu ne havas propran bibliotekon. La ekzemplo estas imitinda.

EKSPOZICIO. — La tuta materialo troviĝas jam en la manoj de la faktestrino, S-ino Volquemant, en Lille. Meze de Februaro tiu materialo estis sendita al Armentières, kie la loka grupo aranĝis sukcesplenan ekspozicion.

GAZETARA SERVO. — Tiu fako funkcias kontentige. Multaj gazetoj publikigas esp. kronikon, kiun sendas al ili regule la fakgvidanto. Mallongaj raportoj pri la funkciado de tiu fako aperas en *Nf. E.*, same kiel la raportoj pri izoluloj.

II. **LA STARIGO DE NOVAJ GRUPOJ** renkontas ĉiam la saman malfacilaĵon — la mankon de taŭga loka profesoro, scipovanta gvidi kurson laŭ rekta metodo. Nia federacio faras sian tutan eblon por kontraŭstari tiun malfacilaĵon ; ĉiujare ni aranĝas specialan someran kurson en Malo ; bedaŭrinde alvenas precipe nur kandidatoj el aliaj regionaj federacioj. La arteza distrikto, kie oni havas eblecon krei multajn grupojn solvis la problemon aranĝante specialan kurson por profesoroj ; gvidas ĝin, S-ro Brunet, el Arras.

